

Unu Biblio sed Multaj Eklezioj - Kial?

La Problemo

La kristanaro enhavas multajn diversajn sektojn: Orientan Ortodoksan, Romkatolikan kaj nekalkuleblan nombron da Protestantoj grandaj kaj malgrandaj. Ĉiuj sinceraj kristanoj tre bedaŭras tiun fakton, sed ne povas ŝanĝi ĝin, dum nekredantoj mokas kaj ĝojaĉas pro ĝi. Sed ĉiu eklezio pretendas, ke ĝi baziĝas sur la Biblio, kaj agnoskas, ke Jesuo Kristo estas la Sinjoro. Kiel okazis tia situacio, kaj kial ĝi tiom longe daŭris?

Antaŭvidita

La unua kaj tre surpriza fakto estas, ke tiu situacio estis longe antaŭvidita. La apostolo Paŭlo avertis al la Efesanoj pri tio:

“Mi scias, ke post mia foriro eniros inter vi kruelaj lupoj, ne lasante la gregon sendifekta; kaj eĉ el inter vi mem leviĝos viroj perverse parolantaj, por forlogi post si la disĉiplojn.”

(La Agoj 20:29-30)

Petro simile klare avertis: *“... inter vi estos falsaj instruistoj, kiuj sekrete enkondukos herezojn, pereigajn ... kaj ilian senbridecon sekvos multaj, per kiuj la vojo de la vero estos kalumnita.”*

(2 Petro 1:1-2)

Tiu malbono jam komencis okazi kiam Johano skribis je la fino de la unua jarcento: *“... kiel vi aŭdis, ke antikristo venas, jam leviĝis multe da antikristoj, ... de ni ili eliris ... multaj falsaj profetoj eliris en la mondon.”*

(1 Johano 2:18-19; 4:1)

Kvankam Jesuo kaj la apostoloj predikis la veron, tre baldaŭ aperis falsaj doktrinoj, homaj ideoj, kaj tiu situacio fariĝis pli malbona dum la postaj jarcentoj.

Unu Biblio

La Biblio estas la vorto de Dio kaj la sola fonto de la vero. Se homoj deziras trovi la veron ili devas serĉi ĝin en la Biblio, la tuta Biblio kaj en neniuj aliaj libroj. Per la Biblio Dio parolas al la homoj. Jesuo agnoskis, ke la “Skriboj” (tio estas la Malnova Testamento) estas veraj, fidindaj, la vorto de Dio. Li ofte riproĉis homojn, ke ili nek scias nek kredas la Skribojn: *“Vi eraras, ne sciante la Skribojn ... ĉu vi ne legis tion, kio estas dirita al vi de Dio ...”* (Mt. 22:29,31) En tiu lasta citaĵo Jesuo klare deklaris, ke la vortoj pri kiuj li parolas en Eliro 3:6 estas la vortoj de Dio al tiuj homoj, kiujn li riproĉis.

Por kompreni la Biblion oni devas legi ĝin sen antaŭformitaj ideoj. Necesas legi ĝin humile, dezirante lerni tion, kion ĝi instruas. Multaj venas al ĝi serĉante subtenon por siaj propraj ideoj, kiujn ili jam akiris de aliaj fontoj. Kiam la apostolo Paŭlo predikis al la Bereanoj tiuj *“... ĉiutage esploris la Skribojn, por konstati ĉu tiuj aferoj estas veraj.”* (Ag.17:10-11) Paŭlo ne riproĉis ilin, ke ili tion faris; li ne supozis, ke ili devas kredi liajn vortojn sen kontroli ĉu tiuj akordas kun la Skriboj. Al la Tesalonikanoj li konsilis *“...elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona.”* (1Tes.5:21)

Estas notinde, ke Petro taksis la leterojn de Paŭlo egale aŭtoritatajn kiel la ceteraj libroj de la Biblio, kaj avertis la kredantojn pri tiuj, kiuj *“tordas”* tiujn skribaĵojn: (2Pet.3:15-16). Paŭlo

mem taksis la Bibliion pli alte ol io alia: “... *la sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo per la fido, kiu estas en Kristo Jesuo.*” (2Tim.3:15) Per tio Paŭlo certigis Timoteon, ke la Biblio sufiĉas por instrui la veron pri Dio. Sekve la homoj nepre devas legi la Bibliion por si mem. Sed se eblas trovi la veron per legado de la Biblio, kio kaŭzis la nuntempan konfuziĝon?

Multaj Eklezioj

La Reformacio de la 16-a jarcento en Eŭropo donis fortan esperon, ke se ĉiu homo povus legi por si mem la Bibliion en sia propra lingvo, ĉiu malkovros la veron pri Dio kaj tiel ili unuiĝos en komuna kredaro. Sed tio ne okazis; tute male. La kialon klarigis Paŭlo jene:

“... venos tempo, kiam oni ne toleros la sanan instruon; sed havante jukantajn orelojn, amasigos al si instruantojn, laŭ siaj deziroj; kaj lil deturnos de la vero sian orelon, kaj turnos sin flanken al fabeloj,” (2Tim.4:3-4)

Per tio Paŭlo klarigas, ke la homoj laŭnature emas deturni sin de la vero dia. Ili preferas siajn proprajn ideojn kaj filozofiojn same kiel, antaŭ la kristana epoko, la paganoj faris al si idolojn. Oni ne kulpigu la Bibliion mem ĉar ĝi estas sankta, “*inspirita de Dio*” (2Tim.3:16).

Alia kaŭzo de la problemo fakte malkaŝiĝas en kelkaj el la lastaj vortoj de la Biblio:

“Mi atestas al ĉiu, kiu aŭdas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro: Se iu aldonos al ili, Dio aldonos al li la plagojn, skribitajn en ĉi tiu libro; kaj se iu forprenos el la vortoj de la libro de ĉi tiu profetaĵo, Dio forprenos lian lotaĵon el la arbo de vivo kaj el la sankta urbo.” (Apok.22:18-19)

En tiuj vortoj troviĝas la du gravaj reguloj por la studado de la Biblio, nome:

1. Ne aldonu al ĝi. Kelkaj sektoj havas siajn proprajn librojn, kiujn ili taksas kiel egalaj al la Biblio. Ekzemple la Mormonoj havas sian ‘Libro de Mormon’; la Kristanaj Sciencistoj havas sian ‘Scienco kaj Sano’ skribitan de Mary Baker Eddy; la Bahaanoj havas le skribojn de Bahao. Aliaj eklezioj, ekzemple la Romkatolika kaj la Ortodoksa, havas tradiciojn, amasigitajn dum jarcentoj, kiujn ili rigardas kiel egale inspiritajn kiel la Biblio mem.
2. Ne forprenu de ĝi. La Biblio estas unu libro. Malgraŭ tio, ke ĝi estis verkita de multaj homoj dum jarcentoj, kaj enhavas sesdek ses librojn, Dio mem inspiris la verkantojn kaj ĝi estas lia vorto. Ĝi enhavas unu mesaĝon, kiu estas la sama tra la tuto. Por ĝuste kompreni ĝin oni devas legi la tutan. Multaj malpravaj ideoj devenas de la emo legi nur parton kaj malatenti la ceteron. Grava principo de Biblio-studo estas, ke neniu grava doktrino aŭ praktiko baziĝu sur nur unu citaĵo.

Ĉu gravas?

Vidante tiom multe da diversaj eklezioj la homoj emas reagi, jen per la penso:

‘neniu kredo estas fidinda, kaj ne eblas certiĝi pri io ajn’;

jen per la penso:

‘ĉiuj ideoj estas egale validaj; ekzistas multaj vojoj, kiuj havas la saman celon kaj kondukas fine al la sama loko.’

La unua reago kondukas al agnostikismo, kiu estas tute sencela kaj senespera. La dua ŝajnas bona, ĉar ĝi montras toleremecon, estas facila kaj donas esperon, sed ĉu ĝi estas vera? Ĉu ĝi estas eĉ verŝajna? Ĉu estas verŝajne, ke Dio, kiu kreis la mondon kaj subtenas ĝin ĉiutage, povas esti indiferenta pri la ideoj, kiujn la homoj tenas pri li kaj lia vorto? Ĉu ne estas pli racie supozi, ke tiu, kiu kreis la homojn havas por ili celon, kaj donis al ili sciigon pri si kaj pri tiu celo? Ne sufiĉas havi sincerajn kredojn ĉar oni povas esti sincere malprava.

La apostoloj kaj la disĉiploj terure suferis por prediki kaj konservi la unu veran evangelion kaj vivmanieron. Ili estis batitaj, malliberigitaj, ŝtonmortigitaj, skurĝitaj - kial? Certe ne pro io, kio ne vere gravas. Ili sciis, ke la vero, kiun ili predikis estas absolute nepra; ili havis firman celon ĉiariske sciigi la homojn pri ĝi. Se ne gravas kion oni kredas aŭ kiamaniere oni adoras Dion, tiuj apostoloj tute ne bezonis tiel suferadi. Se ne gravas trovi la veron kaj firme teni ĝin, tute ne necesis, ke Paŭlo kaj la aliaj skribu la epistolojn.

Nur Unu Vojo

Ĉu la Biblio instruas, ke homoj povas veni al Dio per diversaj vojoj? Jesuo diris:
“Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la perejo, kaj multaj tra ĝi eniras. Ĉar mallarĝa estas la pordo kaj malvasta estas la vojo kondukanta al la vivo, kaj malmultaj ĝin trovas.” (Mt.7:13-14)

Inter tiuj religioj, kiuj agnoskas Jesuon, ne ĉiuj povas esti veraj. Tio estas evidenta pro tio, ke iliaj doktrinoj ofte kontraŭdiras unu alian. La Biblio instruas sen ia dubo, ke la homoj povas alproksimiĝi al Dio nur per tiu vojo, kiun li provizis. Paŭlo uzas emfazajn vortojn skribante al la Galatoj, kiuj rapide delogiĝis de la vera evangelio:

“Se eĉ ni, aŭ anĝelo el la ĉielo, al vi instruas ian evangelion krom tiu, kiun ni jam al vi instruis, tiu estu anatemita.” (Gal.1:8-9) Tiel grava estas tio, ke li ripetis ĝin.

Kiel elekti?

Ĉiu kredanto devas mem konstati ĉu sia fido kaj sia eklezio baziĝas sur la vero aŭ nur sur homaj tradicioj. Ĉiu homo devas serĉi por si mem la veron. Ne sufiĉas pledi, ke oni devas akcepti instruon de iu pastro aŭ pastoro aŭ eklezia klerulo, ĉar tiuj povas instrui nur la tradiciojn, kiujn ili mem ricevis kaj kiuj povas ne akordi kun la Biblio. Ne estas facile ŝanĝi la kredon, kiun oni tenis multajn jarojn, sed povas esti necesa. Postulas humilecon agnoski, ke kredoj firme tenitaj povus esti malpravaj, kaj konvertiĝi, sed tion faris ĉiu kredanto en la unua jarcento, ĉu judo ĉu pagano.

Estas tamen feliĉe, ke por la sincera serĉanto la elekto fariĝas pli facila pro la jenaj vortoj de Jesuo:

“Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havas amon unu al alia.” (Jn.13:34-35)
“Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj ...” (Mt.5:44)

Tio provizas rimedon por pruvo pri la vera disĉiplo; pruvo pri la vera eklezio. Iu ajn eklezio aŭ sekto, kiu subtenas militon, persekutas iun ajn aŭ uzas perforton ne povas esti la vera eklezio.

Nekredantoj ofte kritikis la religion dirante, ke tiu kaŭzas militojn, sed tio ne estas ĝusta. Nur falsaj religioj kaŭzas militojn; la vera religio ne povas kaŭzi militon. Ne povas esti ia 'sankta milito' ĉar veraj kristanoj neniam batalas aŭ persekutas aŭ malpacas. Sekvas, ke laŭ tiu provo la plej multaj eklezioj montriĝas falsaj ĉar dum du mondmilitoj pastroj kaj pastoroj de preskaŭ ĉiuj kristanaj eklezioj subtenis siajn proprajn militistojn preĝante, ke Dio benu ilin. Sed *"... la servisto de la Sinjoro devas ne malpaci ..."* (1Tim.2:24)

Resumo

1. La Biblio estas la sola aŭtoritato. La vera eklezio nek forprenas de ĝi, nek aldonas al ĝi, kaj ne cedas al iu ajn homo la rajton ordoni kiel kompreni ĝin. Scio pri la vero kaj kredo al ĝi estas nepre necesaj. Jesuo diris *"... kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita."* (Mk.16:16)

2. Dio postulas obeon. La vera eklezio strebas obei la ordonojn de Dio, kiujn Jesuo donis, prefere ol amasigi al si multajn homajn tradiciojn. La homo ĉiam emas bazi sian religion sur aferoj ne trovitaj en la Biblio.

3. La ĉefa ordono estas amo, sen kiu nenio iel valoras:

"Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj ... se mi posedus la profetpovon kaj komprenus ĉiujn misterojn kaj ĉian scion; kaj se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi montojn, ... kaj se mi disdonus mian tutan havon por nutri la malsatulojn, kaj se mi lasus mian korpon por forbrulo, sed ne havas amon, per tio mi nenion profitus." (1Kor.13:1-3)

La vera eklezio ne partoprenas ian batalon, persekutadon aŭ malpacon ĉar *"Amo ne faras malbonon al proksimulo; amo do estas la plenumo de la leĝo."* (Rom.13:10)

Jean Field